

ONI PORTU LIN EN LA DO-MEGON!
FRAŬLO! FRAŬLO JOHANO!
MI NE RAJTAS ENMIKSI MIN EN ILIAN AFERON.
FRATO, VI VENKIS. MI NE HAVIS SUFIĈAN KURAĜON POR EN-SALTI EN LA LAGON.
KIAL VI NE PERMESAS AL MI FLEGI JOHANON?
LI HAVAS AKUTAN PNEŬ-MONI-ON...
BONŜANCE LI ESTAS EKZERCI-ĜEMA. ĈIO IROS BONE EKDE NUN.
EKDE TIU NOKTO, KAJ DUM TRI TAGOJ, JOHANO HAVIS KONSTAN-TAN FEBRON.
ĈAR VI ESTAS SEN-SIGNIFA POR LI!
KIO?!
MI ES-TAS LIA KOR-AMIKINO!
MIKAELINO ESTIS ĈIAM APUD LI, KIEL FLE-GISTO.


NUR RIGAR-DU!
TIUJ DU ESTAS LA VERA PARO.



VI NENIAM ESTIS EN-AMIĜINTA AL MIA FRATO!
VI NE RAJTAS DIRI TION!
KIEL TERURE! KAJ MI?!
ĈU TIU KISO ESTIS SENSIGNIFA POR LI? SE LI MENSOGIS, MI NENIAM PARDONOS LIN!
MI NE HAVAS ALIAN TEMON, SUR KIU MI POVUS KONCEN-TRIĜI...
MIKAELINO, MI POVAS PENSI NUR PRI VI, MAL-GRAŬ MIAJ KLOPODOJ FORGESI VIN...
KIA FRIPO-NO!
ĈU LI KREDAS, KE VI ESTAS NE-RESPEKT-INDA?
LI MOKIS MIN! TIO ESTAS NEPAR-DONEBLA!
MI NE POVAS KREDI, KE LI HONTIGIS MIN TIOM MULTE!


HE, STEFANINO!
MI HAVAS BONEGAĴON, RIGARDU!
EN ORDO...
MI FAROS ĈION EBLAN POR TROVI INFORMON PRI MIKAELINO!
MI TROVIS ĜIN EN LA ĈAMBRO DE MIKAELINO. ESTAS MULTE DA INFORMO PRI ŜI!
LA TAG-LIBRO DE LA FORPASINTA BIENMASTRO!
KIO ESTAS TIO, PAĈJO?
FRAP
BONE, ATENDU MINUTON...
NI LEGU ĜIN!


KIU POVUS FRAPI JE LA PORDO MEZE DE LA NOKTO?
MAL-FERMU ĜIN!
MIA NOMO ESTAS HINDLO. MI ESTAS FREMD-ULO.
FAKTE... MI VOLAS PAROLI AL VI PRI TIU INO LOĜANTA EN LA DOMEGO... ŜI NOMIĜAS MIKAELINO.



MI VOLAS FARI KEL-KAJN DE-MANDOJN AL VI.
ĈU VI KONAS MIKAELINON, SINJORO?
NU... MI ESTAS ARTISTO, KIU VA-GAS EN LA REGIONO PENTRANTE BILDOJN...
MI PEN-SIS, KE ŜI POVUS ESTI LA FILINO DE VIRINO, KIUN MI KONIS PA-SINTECE.
VIRINO, KIUN VI KONIS, ĈU?
PAĈJO, NI NE PAROLU ĈE LA PORDO. BONVOLU ENPAŜI, HINDLO.
HA HA HA... TIU MASKO TUJ DEFALOS DE VIA VIZAĜO, MIKAELINO.
NU, SINJO-RO...


RAVELIN J. LANTOO, ĈU NE?
LA DUA FILO DE LA BIENULO. LA ALIA NOMIĜAS JOHANO J. LANTOO.
RAVELIN J. LANTOO PREZENTIS ŜIN KIEL PARENCON. SED VERE ŜI ESTAS LA FILINO DE ARBARISTO.
ŜI VENIS LA 24-AN DE DECEMBRO.
KIA ESTAS LA FAMILIO DE MIKAELINO? EL KIE ŜI VENAS?
PLI GRAVAN DEMANDON MI HAVAS... KIAM ŜI KOMENCIS LOĜI EN LA BIENO?
JES JA, TIU DUA NOMO ESTAS DELONGA TRADICIO EN LA FAMILIO. ILIA PATRO NOMIĜIS GUSTAVO J. LANTOO.
TIU «J» VENAS DE «JOZEFO», ĈU? ILI HAVAS LA SAMAN DUAN NOMON...
GUSTAVO JOZEFO LANTOO!
GUSTAVO...
?
RIGARDU TIUN ĈI DESEGNAĴON.
BONE. JEN...




LA INO DESEGNITA NE ESTAS MIKAELINO.
NE...
MI DESEGNIS ĈI TION ANTAŬ MULTE DA TEMPO...
TIU VIRINO PROBABLE ESTAS LA PATRINO DE MIKAELINO.
MIKAELINO!!
JES! TIU ESTAS MIKAELINO, ĈU NE?
PASINTECO ESTAS TRE MALPROKSIMA. LA TEMPO PASIS KIEL UNU-SEKUNDA SONĜO...
DEK KVIN JAROJ PASIS...
ĈI-NOKTE NI DRINKU TOSTE LA PASINTECON, DO!
BONE, SINJORO! NI DRINKU IOMETE.


LUN-LUMO...
BLANKA, MILDA LUMO.
MI SENTAS MIAN KORPON PEZA.
KIEL STRANGE! MI ESTAS VARMA, KVAZAŬ MI HAVUS FEBRON.
KIAL MI ESTAS EN LITO?
AJ...!
HO, JES!
MI SALTIS EN LA LAGON POR SAVI MIKAELINON!
MIKA-ELINO!


MIKAELINO...
MI FOJFOJE VEKIĜIS PRO LA FEBRO, KAJ MI VIDIS ĈIAM ŜIN APUD LA LITO, KUN ZORGOPLENA MIENO.
ŜIA HARARO ESTAS TIEL BLONDA, KE ĜI ESTAS PRESKAŬ DIAFANA.
MI ĈIAM VOLIS TUŜI TIUJN HAROJN.
ŜI PLAĈIS AL MI EKDE KIAM MI VIDIS ŜIN LA UNUAN FOJON EN TIU ARBARO...
TAMEN, MI ĈIAM FARIS LA MALON DE TIO, KION DIRIS MIA KORO.
KIAL MI NE OBEIS ANTAŬE MIAN KORON?
HMM?


JOHANO!
JOHANO, ĈU VI FARTAS BONE?
JES, MI FARTAS BONE!
IOM DA FEBRO NE POVOS FALIGI MIN!
KIEL BONE!
DANKE AL ĈIELO! SE IO MALBONA OKAZUS AL VI, MI NE SCIAS KION MI FARUS!
DANKON... VI SAVIS MIN DU FOJOJN: ĈE LA FAJREGO KAJ ĈE LA LAGO.
MI SAVUS VIN TIOM DA FOJOJ, KIOM NECESUS.
NENIAM PLU SALTU SUR GLACITAVOLON! ESTAS TRE DANĜERE!
BONE... MI NE SCIIS, KE GLACIO ESTAS ROMPIĜEMA.
NU, VI PRAVAS... ESTIS VIA UNUA FOJO.
EN LA PEJZAĜO EN KIU VI KRESKIS, LA PEJZAĜO APENAŬ ŜANĜIĜIS DUM LA JARO...
VI NE KONIS VINTRON, KIES NEĜO KOVRAS ĈION, NEK PRINTEMPON, KIU APERIGAS FLOROJN.


HO, RAVE-LIN...
NE DIRU TION, MIKAELINO! VI ESTAS MIRINDA. VI LERNAS MULTE DA AFEROJ TRE RAPIDE!
ĜUSTE. ESTIS NUR KELKE DA BLANKAJ FLORETOJ TIE...
MI HONTAS! MI NENION SCIAS!
ĈAR RAVE-LIN...
RAVELIN... MALGRAŬ LIA AFABLECO, MI NENIAM POVIS KORESPONDI AL LIAJ SENTOJ, BEDAŬRINDE...
FINFINE MI SCIAS, AL KIU MI ENAMIĜIS VERE.
SED FINFINE...
JEN LA ULO, KIUN MI ATENDIS DELONGE... JEN LIAJ MANOJ...


SOLSTICA?
BALDAŬ BURĜONOS FLOROJ.
NOKTOMEZA SUNO KONSISTAS EN TIO, KE LA SUNO NE SUBIRAS. ĜI BRILAS LA TUTAN NOKTON...
FESTO DE L' NOKTOMEZA SUNO.
ESTOS FLOROJ EN ĈIU ANGULO DE LA BIENO. KAJ LA UNUAN TAGON DE SOMERO OKAZOS LA SOLSTICA FESTO.
NE TEMAS PRI TAGA HELECO. ESTAS IO PLI MILDA... KIEL VIDI LA LUNON EN LA FUNDO DE LAGO...
DUM LA SOLSTICA FESTO, ONI EKBRULIGAS ĜOJFAROJN APUD LAGOJ KAJ DANCADAS.
KI...
KION VI DIRIS? MI NE KOMPRENIS VIN.
NU, KAJ...
DUM LA SOLSTICA NOKTO, ESTAS PERMESATE...
MIRINDE! ĈU TIU FESTO ESTOS KIEL TIU OKAZINTA ANTAŬ NELONGE?
JES! SED ĜI ESTOS EĈ PLI BRILA KAJ AMUZA!


MI DANCOS KUN VI LA TUTAN NOKTON ĜIS LA MATENIĜO.
DUM TIU NOKTO, ESTAS PERMESATE...
... FARI AMAJN DEKLAROJN.
NI GRAVUROS NIAJN NOMOJN SUR TRUNKO DE ABIO, PROMESANTE ETERNAN AMON.
MI PENSIS, KE VI MALAMIS MIN.
MI PENSIS, KE VI AMIS STEFANINON.
NE MALTRANKVILIĜU, JOHANO...
AL MI SUFIĈAS TIO, KE VIA KORO ŜANĜIĜIS.
PARDONU MIN, MIKAELINO.
MI ESTIS MALAFABLA KUN VI DUM MULTE DA TEMPO... MI DETRUIS LA ARBARON, KIU ESTIS VIA HEJMO.


TIO ESTIS MENSOGO.
KELKFOJE MI FARAS KRUELAĴOJN, MI ESTAS KIEL MIA...
MI ESTAS KIEL MIA PATRO!
...
KIO ESTAS LA PROBLEMO, JOHANO?
HO! LA BABILADO LACIGIS VIN, ĈU NE? RIPOZU PLU!
NE... MI BONFARTAS, MI BONFARTAS.
MI FARTAS BONE NUN. MI VOLAS PAROLI KUN VI LA TUTAN NOKTON.
NE... VIA FEBRO DENOVE ALTIĜOS. KUŜIĜU DENOVE.



MI NE DEVUS KAŜ-AŬSKULTI ILIN, SED SED MI JA FARIS TION!
NUN MI SEN-TAS MIN MIZERA!
FERM
ŜI NERVOZIĜIS KIAM MI NE ESTIS APUD ŜI... KAJ NUN... KIAL?! KIAL?!
ANTAŬE ŜI DEPENDIS DE MI TIOM MULTE...
MIKAELINO, VI ESTIS MIA PLEJ KARA TRE-ZORO!
KAJ MIA FRATO FORŜTELIS VIN DISDE MI!